

ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Dritter Jahrgang



Nr. 12, Dezember 1950

LA 15-a de DECEMBRO

Zamenhof-kaj librofesto



1907 en Frankfurt! D-ro L. L. Zamenhof kun edzino dum sia vizito en Frankfurt. Malantaŭ la veturilo s-ano Barthel, kiu afable disponigis la foton.

MAX BUTIN

TRAVIVAĴOJ kun D-ro Zamenhof

I. Boulogne-sur-Mer - II. Bad Neuenahr - III. Warszawa

I. Boulogne-sur-Mer 1905

Kiu asertas, ke mi estas „la lasta mohikano“, kiu persone interrilatis kun nia majstro, eraras; ekzistas en kelkaj landoj ankoraŭ maljunaj kunbatalantoj, kiuj povus rakonti pri li. Estis hazardo ke mi, migrante tra ĉefstrato de Kolonjo, vidis Esperanto-lernolibron en la montra fenestro de librejo. Eble tiuj pravas, kiuj diras, ke hazardo ne ekzistas, ke ĉio estas destino; nu, tiukaze mi benas la tagon de tiu destino. La kalendaro notis la 12an de oktobro, kiam tio okazis; mi festis mian nomtagon; kaj la jaro? 1904. Aĉetinte la libreton, mi tuj ekstudis; la tutan nokton la lumo brulis en mia dormĉambro, kaj la sekvintan antaŭtagmezon mi devis toleri, ke mia se-

vera instruisto en la gimnazio ofte riproĉis min pro neatento dum la leciono. Pro tio, ke la Esperanto-lerniloj tiamatempe ne estis tiel detalaj kiel la postaj, restis multo demandenda; kelkloke necesaj klarigoj tute mankis. Fine mia demandoplena notlibreto postulis respondojn kaj ordigon de la abunda materialo. Do, kion fari? Trovinte la adreson de D-ro Zamenhof en la volumo mem, mi kurage decidis, turni min al la aŭtoro kaj peti de li helpon. Dirite, farite. Mi bezonis du horojn por redakti leteron, kiu sendube ne estis senerara, kaj atendis. Tri semajnoj pasis senrezulte, sed iutage la postisto enmanigis al mi leteron kun rusa poŝtmarko. Avide kaj sen-

(Daŭrigon vidu p. 961)

Nova Zamenhofaĵo? Verŝajne!

En 1912 la konata naturamika societo Kosmos atingis membronombron de centmil. Okaze de tiu fakto la redakcio de la Kosmos-gazeto faris enketon al pluraj „sciencistoj, verkistoj, artistoj kaj amikoj de nia movado“ kaj petis ilin esprimi sian opinion pri la demando: „Ĉu la germana popolo havas la rajton esti daŭre informata pri la progresoj de la naturscienca esplorado en ĝenerale komprenebla formo?“

Kaj la respondojn al la demando oni publikigis en la gazeto. Inter multaj profesoroj, doktoroj, ĉefredaktoroj ktp., preskaŭ ĉiuj Germanujo kaj Aŭstrujo, ni trovis unu mallongan artikoleton de perantlingvan:

Dr. L. Zamenhof, Warschau

Ke la germana popolo havas la rajton esti informata pri la progresoj de la naturscienca esplorado — pri tio, lau mia opinio, povas ekzisti nenia dubo. Sed mi opinias, ke, donante al la popolo la faktojn de tiu esplorado, oni devas esti iom singardema kun la konkludoj, por ke la ofte tro subjektivajn hipotezojn oni ne altrudu al la kredemaj homoj kiel aksiomojn.

(Jarkolekto 1912, kajero 9, paĝo 360.)

Tiu artikoleto aperis sen traduko inter la aliaj artikoloj germanlingvaj. La ŝ en la teksto estas presita: u; aliaj supersignoj ne enestas.

Dr. L. Zamenhof-Warschau kiel aŭtoro — tio ja ne estas tute klara. Ankaŭ la frato de nia majstro estis D-ro L. Zamenhof-Varsovio. Sed mi opinias: se la redakcio mem sin turnis al diversaj sciencistoj, verkistoj ktp. — kaj inter ili al medicina doktoro, ligita kun la lingvo Esperanto, en Polujo — tiam la redakcio certe elektis la plej famajn, kaj ĝi do kredeble turnis sin al la aŭtoro mem kaj ne al ties frato.

Ankaŭ la stilo de la respondo ne kontraŭas al tiu konjekto; male, ĝi estas tipe tiu de nia majstro en ĉiuj detaloj.

Ni do havus novan zamenhofaĵon, pri kies ekzisto ni ĝis nun ne sciis.

Kaj cetero: ĉu D-ro Zamenhof en sia respondo ne trafis la kernon de la problemoj?

Hans Wingen.

pacience mi malfermis ĝin; la majstro tre ĝentile en patra maniero estis pritraktinta ĉiujn miajn demandojn. Tiamaniere kelkaj skribaĵoj sekvis, ĝis komence de l' printempo mi devis interrompi la korespondadon pro troa okupiteco en la lernejo.

Kiam mi foje havos la okazon koniĝi kun D-ro Zamenhof? Jen demando, kiu ofte premis kaj multfoje min preskaŭ senesperigis. La monatoj forglitis, kaj komence de julio 1905 mi ricevis la permeson de miaj gepatroj, pasigi miajn feriojn en miaj parencoj en Parizo. La libere tempo komenciĝis en la unuaj tagoj de aŭgusto. Informinte miajn gekuzojn, mi ekveturis. Mi jam estis ekscitita, ke en la franca ĉefurbo debutas sudamerika dancistino, vera fenomeno, preskaŭ nuda, kiu move ŝvebanta sur la scenejo. Febre mi atendis tian spektaklon. Ĉe la belga-franca limo la trajno haltis; la pasaĝeroj elvagoniĝis kaj, promenis legante, fumante aŭ mangante sur la kajo. — Ha, la nuda dancistino! Eble mi vidos ŝian foton en la plej ĵusa numero de „Paris Soir“. Tiaj pensoj zigzagis tra mia cerbo. Mi rapidis al gazetstano en eta kiosko, aĉetis kaj promenadante malfaldis la ĵurnalon. Ho ve, bildo de la dancistino ne enestis.

Jam enpoŝigante la foliojn, mi legis la jenon: Kongreso de Esperanto. En Boulogne-sur-Mer kunvenis ĉ. 800 Esperantistoj el 30 landoj; inter la kongresantoj troviĝas ankaŭ la aŭtoro de la internacia lingvo, D-ro Zamenhof, kun edzino. Antaŭ miaj okuloj dancis fajreroj, la sudamerikanino estis forgesita; mi estis tiel ekscitita, ke mi kvazaŭ fuganto kubutpuŝante serpentis tra grumblanta kaj indignanta homamaso por atingi mian kupeon. Mi volis esti sola. Sed deĵoranta fervojisto miskomprenis la kaŭzon de tia sagrapida forpafo; tuŝante mian ŝultron, li diris severtone, ke ne estas permesite uzi la necesejon, kiam trajno haltestaras en stacidomo. Mi estis tiel konsternita pri la ĵus legita, ke mi respondis sencece kaj konfuze: la suspektema oficisto diris al apudstaranta kolego: „C'est un fou.“ Laŭŝajne li ne fidis miajn vortojn, ĉar, rigardante tra la fenestro sur la kajon, mi konstatis, ke li fiksokule kun kurbita dorso kontrolis, ĉu la frene-

Al ĉiuj niaj geamikoj ni sendas korajn bondezirojn pro Kristnasko 1950 kaj Novjaro 1951!

zulo ne tamen eble vizitis la kabinejon por korpa liberigo; poste ambaŭ trajnistoj rigardis sub mian vagonon. —

Releginte eble dekofoje la noteton en la ĵurnalo, mia plano estis preta; la dancistino fantomiĝis, interna voĉo flustris: ek al Bulonjo!! —

Post mia alveno en Parizo miaj gekuzoj, venintaj por bonvenigi min, ĉirkaŭdancis min kiel indiaĵoj kaj kriis la nomon de la nude dancanta belulino, la kuzinoj kisigis min (tre agrabla kaj imitinda franca kutimo), kaj ni veturis hejmen. La onklino, vidante min, surnazigis okulvitrojn, kiuj estis fiksitaj sur testudŝela stangeto; mi neniam estis vidinta tiajn novmodajn aparatojn. „Kia skandalo“, ŝi diris; „vi certe jam aŭdis pri tiu senhonta malĉastulino, kiu...“ „Jes“, mi respondis. „Nu, ni estas bonaj kristanoj“, ŝi daŭrigis, „kiuj devas pentofari por la tentataj kunhomoj. Hodiaŭ vespere ni iros al la katedralo Notre Dame, kie predikos la famekonata monaĥo patro Eŭsebio, kies admonoj vin edifos“. En tiu drameca momento okazis tumulto; miaj kuzoj furiozis kiel pikitaj taŭroj. Du tasoj sur la tablo rompiĝis, sed fine la bruo ĉesis kaj profunda melankolia rezigno montriĝis sur la vizagaĵoj de la junuloj. „Kara onklino“, mi asertis, „mi neniam estus irinta al la liteatro, ĉar morgaŭ je la sesa mi veturos al Boulogne por paroli kun Doktoro Zamenhof“. La efiko de miaj vortoj estis neatendita. Ree balanciĝis la stranga vidilo sur la iom tro longa onklina nazo, kies aloj tremvibris. „Kiel, kuracisto, sekreta malsano? Kaj pro tio vi venis ĉi tien? Olala, kia honoro!“ „Ne“, mi trankviliĝis la ekscititan parencon. „mi nepre volas interparoli kun la kreinto de Esperanto; lia nomo estas Zamenhof“. Miaj vortoj glatiĝis la ŝaŭmantajn ondojn, la surstangigita nazumo gliitis malsupren, kaj ĉio ree estis en ordo.

La venintan tagon rapidtrajno kondukis min al la maro. En la antaŭhalo de la Bulonja stacidomo flegme balais viro, fumaĉantan cigarredon inter la lipoj. Demandinte lin pri la situo de l' kongresejo, mi aŭdis nur: „Ne scias, ne scias.“ Mi forrapidis el tiu polvonuba halo kaj samsence alparolis ekstere starantan policanon, kiu habilis kun dika kuiristino, je kies femuro pendis salika korbulo plena de fiŝoj, legomoj kaj pano. Versajne mi estis ĝeninta la rendevuon, ĉar la lipharumita gardanto de publika sekureco komencis mokatone prediki: „Ha, jes, sinjoro, mi vidis jam kelkajn de tiuj frenezuloj, kiuj intencas forigi ĉiujn lingvojn kaj anstataŭigi ilin per unusola; ĉu ili forgesis la turon de Babel? Ili blasfemas, ankaŭ herezaj kristanoj ili estas, ĉar ili kunportas la verdan flagon de l' profeto. O, mon Dieu!“

Tamen li sentis kompaton kun la herezuloj, klarigante al mi tre detale la vojon al la urba teatro, kie la gesamideanoj kunvenis. Veninte tien, mi rimarkis multajn personojn en la vestiblo de la impona konstruaĵo. Senhezite mi eniris kaj aŭdis unufoje vortojn kaj frazojn en Esperanto. Kia emocio en mia interno! Mi turnis min al sinjoro petante, ke li konduku min al nia majstro. „Tio nun ne estas ebla; la kongresanoj estas en la salonego, kie okazas laborkunsido; atendu ĝis tagmezo!“ Ĉi-loke mi devas menciigi, ke mi tiam tute ne sciis, kion signifas kongreso, mi eĉ ne havis enirbileton; neniu konis mian nomon. Oni miros aŭdante, ke mi reformvojaĝis al Parizo la saman tagon de mia alveno, ĉar mankis al mi mono por la tranoktado. Tial mi ne rajtas aserti, ke mi ĉeestis la unuan kongreson de Esperanto. Se mi estus sciinta iomete pri tio, kion mi nun scias, mi estus trovinta rimedon kaj serĉinta monsubtenon. Hodiaŭ mi bedaŭras tion.

La tagmezo alproksimiĝis, kaj mi pacience atendis la venon de la granda momento. Porĵoj malfermiĝis kaj entuziasmigitaj homoj interbabilante amasiĝis en la halo, sur la ŝtuparoj kaj sur la strato. Cie nia lingvo, kiun kelkaj parolis jam flue kaj elegante. Subite mi rimarkis grupeton de eble ok personoj. Laŭiĝis krioj: „Vivu Esperanto, vivu Zamenhof!“ Mi rimarkis malaltstaturan viron en nigra vesto, kun laksoj kaj blanka kravato; sur la kapo li havis altan silkcapelon, sub la brako ledan aktujon. Apud li staris samstatura homo en griza redingoto kaj kun simpla rondĉapelo; li portis okulvitrojn, aspektis kiel vilaga instruisto kaj vikle parolis kun la festevestita sinjoro. Poste mi eksciis, ke la eleganta sinjoro estis Michaux, unu el la du prezidantoj de l' Kongreso.

Cu mi fakte risku prezenti min al la eminentulo? Remembrante la pasintagan surkajan scenon, mi efektiviĝis mian firmam decidon, profunde en kaj elspiris kaj kuraĝe antaŭenpaŝis. Post deca riverenco mi emfaze parolis al la frakvestita sinjoro: „Estu salutata, tre estimata sinjoro doktoro. Mi venas el G. en Germanujo.“ Subite mi ruĝiĝis; la ceterajn belajn frazojn, parkere lernitajn, mi estis forgesinta. En tiu momento de embaraso la alparolito ridetis kaj fingremontre atentigis min pri la apude staranta modeste vestita viro, dirante: „Jen Doktoro Zamenhof.“ Antaŭ ol mi povis ripeti mian salutparolon, nia majstro premis mian manon kaj diris: „Ha, estas vi, la gaja rejnlandano, kun kiu mi korespondas. Mi ĝojas, ke vi venis. Cu vi havis bonan vojaĝon?“ Ni konversaciis eble dudek minutojn; poste la sinjoro foriris por tagmanĝi. (Daŭrigota)

In der nächsten Nummer:

Jen Munkeno!
Hochdeutsch — Hocheuropäisch
Aus der Esperanto-Welt
Lingvaj anguloj
Immer wieder dasselbe Lied
Hispanaj skizetoj
Unsere Leser haben uns geschrieben
Die EP-Rakete
La Nekonatino
La Kanto pri Ĥiavata

Weihnachten

Vom Himmel in die tiefsten Klüfte
ein milder Stern herniederlacht;
vom Tannenwalde steigen Däfte
und hauchen durch die Winterlüfte,
und kerzenhelle wird die Nacht.

Mir ist das Herz so froh erschrocken,
das ist die liebe Weihnachtszeit!
Ich höre fernher Kirchenglocken
mich lieblich heimatlich verlocken
in märchenstille Herrlichkeit.

Ein frommer Zauber hält mich wieder,
anbetend, staunend muß ich stehn;
es sinkt auf meine Augenlider
ein goldner Kindertraum hernieder;
ich fühl's, ein Wunder ist geschehn.

Theodor Storm.

Kristnasko

De la ĉiel' al plejprofundo
malsupren ridas milda stel';
kaj ŝvebas nun odor-abundo
el vintra abiara fundo,
la nokt' fariĝas lum-kandel'.

Goj-time mi ektremas kore:
ho, kara tempo de Kristnask'!
Sonadas sonoriloj fiore,
al hejmo ili logas, fore,
en romantik-fabela fask'.

Kaj pia sorĉ' min ree prenas,
mir-adorante staras mi;
kaj la okulojn revo benas:
or-sonĝo el junec' revenas.
Miraklon sentas mi. Jen ĝi!

Jfb.



Christbaumseligkeit

Kristarbo-feliĉeco

Sankta Nikolao volis moderniĝi

Kelkaj homoj suspektis, ke en 1932 S-ta Nikolao estos mortinta. Sed kial? Kompreneble ne. Estas vero, ke li estis jam maljunega kaj iom malrapide pensanta. Sed morti? Ho ne!

Male. Li klopodis per ĉiuj rimedoj paŝi kun la tempoprogreso. Tial li jam en antaŭaj jaroj estis komencinta variigi siajn donacojn. Vere la afero ne estis facila por tia maljunulo kia li. Iomete amikiĝi kun tia amaso da teknikaj objektoj ne estis jam por simple elekti radio-maŝinon. Kaj la cetera amaso da teknikaj ludiloj! Nu, laŭeble bone li sciis jam diferencigi la korpon de submarboato de cepelino, sed finfine li lasis la tro subtilajn objektojn al sia helpanto. Sed en ĉi tiu jaro 1932 li intencis nepre alporti ion tute novan. Sed kion, kion? Dum semajnoj li rompis cerbumante sian grizan kapon: senrezulte. Sed jen, mallonge antaŭ la festo li havis genian ekpenson: eble el radio li povus ion eksci. Li eĉ grumblis al si mem, ke tiel malfrue li havis ĉi tiun ideon.

Por ke li ne forgesu, li tuj eniris la ĉelon de la ĉefanĝelo S-ta Ra-

faelo, kiu priservis la ĉielan radiostacion. „Volonte“, diris Rafaelo, aŭskultinte la deziron de l' bona maljunulo. „Kiun stacion?“ Tio estis indiferenta al Nikolao. Li surmetis tie kuŝantajn aŭskultilojn. Post mallonga tempo li ree formetis ilin, kaj kontenta rido ludis sur lia vizaĝo.

Granda surprizo regis en ĉi tiu jaro ĉe ĉiuj infanoj pro la strangaj donacoj de S-ta Nikolao. Por multaj tio estis konataj objektoj, por pli multaj ili estis fremdaj. Ĉiukaze ili taŭgis por kelktempa ludado. Poste ili spertis la sorton de tiom da aliaj ludiloj: ili estis ĵetataj en angulon.

Kio estis okazinta? Kian genian sugeston estis ricevinta S-ta Nikolao per radio? Ni tuj aŭdos!

Nikolao havis la bonŝancon kapti ĝuste la finparolon de preleganto, eĉ pli: predikanto por aerprotekto, kiu varme rekomendis al ĉiuj, granduloj kaj malgranduloj, havi en provizo gasmaskojn. „Nu“, diris al si Nikolao, „se oni tion disvastigas per radio, tiam devas esti grava afero. Do, al la malgranduloj donacos mi la maskojn“. Kaj li jam an-

taŭĝojis pro sia propra moderniĝo kaj aktualeco.

Fulmrapide li transmetis sin al Berlino en la magazeno de granda gasmaska firmo. „Mi deziras gasmaskojn“, li diris al la fabrikanto. „Kiom?“, redemandis tiu. Kaj kiam li aŭdis la respondon de Nikolao: „Por ĉiuj infanoj de la tero“, apenaŭ li povis kaŝi sian egan ĝojon pro la giganta negoco. Tuj li ekprenis telefonan aŭskultilon kaj ordonis ĉion necesan, por ke la mendo estu farata laŭ la deziroj de tia bona kliento.

Cio funkciis bonege, tre kontentige; tion ni aŭdis jam antaŭe. S-ta Nikolao, post plenumo de sia vastega tasko, reiris ĉielen, subridetante en sian blankan barbon kaj admirante sin mem, ke li ĉi-jare sukcesis esti tiel moderna. Vi povas imagi, kiom ega estis lia surprizo, kiam tie akceptis lin lia amiko S-ta Rafaelo kaj senparole kondukis lin al ekrano de l' estonteco. „Mi volas montri al vi ion“, li diris al la barbulo, kaj ĉi tiu scivole eksidis antaŭ la blankaĵo.

Rafaelo iom manipulis en siaj aparatoj. Subite Nikolao revidis siajn tutmondajn infanojn; ili pliaĝiĝis. Panike ili kuris tien kaj tien,

sed ĉiusekunde falis unu el ili. La pli multaj el ili portis lian donacon el 1932: gasmaskon. Sed la tiama formato jam konvenis nur al la etuloj; ĉe la aliaj la maskoj ne hermetike enkadris la kapon. Tial pro la enpenetrinta gaso falis la plej multaj el la infanoj, falante forŝiris de siaj buŝoj la maskojn kaj tuj sekve alprenis la aspekton de sufokitoj.

„Ne, ne, tio estas terura, terura“, balbutis S-ta Nikolao. „Tio ne povas esti! Vi mistifikas min en tre malbela maniero!“ Kaj, ne atendante respondon, li sagrape alvenis ĉe la Berlina fabrikanto. Preskaŭ senspire li rakontis al li sian ĵusan vidaĵon. Li tremis, teruro ankoraŭ skuis lin. Sed la fabrikanto diris sen ekscito: „Nu, trankviliĝu! Unue, ĉio ĉi estas estonta fantaziaĵo; due, se ĝi estus fakto, oni verŝajne uzis alian specon de gaso ol tiun, kontraŭ kiu protektas viaj maskoj. Vi devas scii, ke por ĉiu gaso ekzistas speciala filtrilo, kiun oni antaŭe devas enmeti en la maskon. „Sed se oni antaŭe ne konas la specon de l' gaso?“ — „Tial mi ja liveris al ĉiu masko serion da filtriloj, plene sufiĉantaj por ĉiuj nun konataj gasoj!“ — „Sed por enmeti unu, oni devas ja antaŭe malfermi la maskon?“ — „Efektive. Tiucele oni eniru gassekuran subterejon.“

S-ta Nikolao ne povis tiel rapide pensi. Li nur sentis ke tiuj protektiloj reale estas tute senvaloraj, ĉar ili protektas nur kontraŭ unu sola gasospeco. Kaj krome: Kion fari, se la masko fariĝis tro malgranda por intertempe kreskinta infano?

Lia kapo doloris. Konstante li ĝemis: „Ho, tiuj homoj, ho, tiuj homoj!“ Kaj kiel ofte, li ree iris al sia klera amiko Rafaelo. Tiu detale klarigis al li ĉion. Post kiam li finis la teknikan parton, li aldonis: „Kaj nun mi devas ion konfesi al vi. Vi estas bonkora infanamiko. Via plezuro estas donacadi. Ni ne volis maldolĉigi al vi tiun ĝojon. Sed vidu, ĉi tie ni ne plu okupas nin pri la homoj. Ili fariĝis diabla gento. Ili fariĝis bestoj unu kontraŭ la alia, ne, eĉ pli malicaj. Ĉu en paco, ĉu en milito, ĉiam ĉiu el ili embuskas, insidas malutile al la alia. Ĉu estaĵoj, kiuj elpensas tiajn kruelaĵojn kiaj estas gasatakoj kaj milito kun ĉiaj siaj sekvoj, meritas nian amon? Antaŭ nelonge ili furiozis en la tuta mondo unu kontraŭ la alia. Ili nuntempe nenion lernis, nenion forgesis.“

Kion volis rediri la bona malĵunulo? Li silentis, kaj ŝajnis, ke io akva ekbrilis en liaj okuloj. Li ja estis jam tre malĵuna. Fine li respondis: „Do, venontan jaron ankaŭ mi ne plu povos iri al ili“, kaj seka singulto tremigis lian kadukan korpon.

Ci tiu moderna fabeleto estis verkita jam en 1932, sed ne publikigita. Ĝi estas premiita en la Internaciaj Floraj Ludoj de 1933.

Jrb.

Dommastrinoj kontraŭ lokomotivistoj

Ne fimu — ne okazis interbatiĝo inter la sinjorinoj kaj la lokomotivistoj. Ambaŭ estis nur objekto de serioza scienca esploro, por fini longan disputon. Ĉar ankoraŭ disputadas viroj kaj virinoj, fraŭloj kaj avinoj pri tio, kiu laborkvanto estas postulata de dommastrino.

Ni scias, kion oni postulas de dommastrino. Ĉiam, de mateno ĝis vespero, ŝi devas esti preta, teni en ordo sian loĝejon, aŭskultadi la centoblajn alvokojn de siaj infanoj kaj tre ofte ankaŭ ilin respondi. Ŝi devas priatenti iliajn lerntaskojn kaj ankoraŭ unu fojon familiariĝi kun frakcioj — kvankam ŝi troviĝas daŭre en bataleto kun sia propra mastruma libro. Ŝi devas ĉiam scii kiel profetino, kiun ĉemizon dezirus surmeti la edzo kaj kiu butono dum la tago malfiksiĝis. Krome ŝi ĉiam ridetu. Ŝi devas ankaŭ kuiri, aĉeti, lavi kaj gladi — plenplena tagokupo, kaj kiam vespere en radio oni kantas: „Kaj ree bela tag' finiĝas“, ŝi supozeble pensas: „Dank' al Dio!“ kaj tiras jam je la deka fojo lanfadenon tra la kudrila trueto, ĉar la ŝtrumpoj montras truegojn.

Certe ĉi ĉion la sciencistoj ne pripensis, sed ili tamen provis unu fojon trovi iun normon, kian korpan laboron faras dommastrino. Ĉar domlaboro ja estas saniga, sed nura matengimnastiko ĝi ne estas.

Tute sobre kaj objekte do oni konstatis en instituto, ke dommastrino faras samkvantan laboron kiel lokomotiv-ĥejtisto aŭ sablofoseja laboristo, se oni supozas ĉiutagan laborotempom de 10—12 horoj. Ĉar en la dommastrumado tiel longa laborotempo nepre okazas, en la plej multaj kazoj la laborotago komenciĝas matene je la 6-a kaj finiĝas vespere je la 20-a, se pri kudrado, trikado kaj flikado oni volas paroli nur kiel pri „ripozigaj laboroj“. Unu horo da surplanka frotlaboro necesigas same tiom da fortoj kiom la ŝarĝado de 1000 kg da karbo sur 1,5 m altan veturilon. Unu horo da plankpolurado (kompreneble je plej alta brilo) egalas la forŝoveladon de 1,220 kbm da ŝtonetaĵo. Unu horo da laboro ĉe kudromaŝino necesigas la saman fortelspezon kiel unu horo da surkampa laboro. Kiam virino staras unu horon ĉe la kuireja forno, ŝi same multe faris kiel ĥejtisto sur vartrajna lokomotivo dum 18 minutoj.

Ci tiuj malmultaj, sed objekte kaj science fiksataj nombroj povas fini unu fojon por ĉiam la konstantan disputon, kiom da laborkvantoj

mastrumantino — ofte tiel enviala — faras ĉiutage. Ni volonte rezignas pri ĉiuj komparoj kun niaj laŭdire tiel multe pli kapablaj patrinoj kaj avinoj — pri bopatrinoj ni tute silentu; ili — la komparoj — ne povas elteni ĉi tiujn faktojn. Ni devas ĉiam konsideri, ke la edzinoj en antaŭaj tempoj vivis sub pli bonaj cirkonstancoj, ke ili havis pli da servantaro kaj en plej maloftaj okazoj havis profesian laboron. Neniel oni rajtas konsideri dommastrinan laboron memkompreneblaĵo. Ni ja vidas, ke ĉiel ni povas konkuri kun sablofoseja laboristo kaj kapabla terkulturisto. Do, retenu tion en via memoro, kiam denove iam, tute vole-senintence, sebutoneto mankas je la blua ĉemizo, ripetigos la konata diro: „Kaj tion vi forgesis ĉe via malmulto da hejmlaboro...!“

Angulo por niaj infanoj

Ĉu povas esti, ke vi ankoraŭ ne pretigis malgrandan donacon por Kristnasko? Kompreneble Esperantan? Nu, jen mi montras al vi ion facile fareblan: Legosignon kun taŭga teksto. Supre vi desegnu belan verdan stelon kaj laŭvole eltondu ĝian supran parton. Kaj poste skribu en la mezo „Fabeleto“ kaj daŭrigu en nova alineo:

Al la reĝo de la Librolando venis iam du libro-civitanoj. La unu el ili estis tute ĉifonita, malpurigita, disŝirita; alrigardante ĝin oni devis ekplori, kiel ĝi mem. La alia estis serioza, kun malĝoja mieno. Ili ambaŭ sin ĵetis al la genuoj de la potenca reĝo, kaj la serioza ekparolis: „Mia kunulo kaj mi estis najbaroj en granda libraro. Ni ambaŭ estis belege vestitaj. Sed rigardu nin nun! Tiel traktis nin la homoj. Mia kunulo estas tute malsana kaj baldaŭ mortos pro la homaj turmentoj. Kaj ankaŭ mi estas kompatinda. Forŝirita estas mia bindaĵo, falditaj kaj ĉifitaj miaj folioj, malpurigita mia antaŭe tiel blankega papero. Tiel traktas la homoj siajn plej bonajn amikojn! Helpu nin, ho bona reĝo!“

La reĝo estis tute kortuŝita. Sed poste li ekkoleregis kaj malbenis la tiel agintajn homojn, por ke ili ne havu plu ĝuon kaj instruon de sia legado, sed nur dolorojn kaj turmentojn kaj maltrankvilan konsciencon. Kaj tiel fariĝis.

LA ANGULETO DE LA VIROJ

Premate en ĉi tiun anguleton, ni tamen krias al la mondo, ke la efektiva teksto de la supra citaĵo el Goethe estas:

La Virinoj estas pladoj arĝentaj,
en kiujn ni (viroj) metas pomojn orajn.

Neŭigkajtoj de la Esperanto-Mondo

Pan-eŭropa Esperanto

Auf einer Versammlung münsterländischer Esperantisten in Münster, November 1950, sprach Dr. Holtmann, Vorsitzender der Sektion für pan-europäische Fragen im DEB, zu obigem Thema. Er führte aus, daß der von manchen Regierungen ausgehende Widerstand gegen die Bildung der Vereinigten Staaten von Europa nur durch eine starke Volksbewegung niedergekämpft werden könne, und daß die allgemeine Verwendung des Esperanto die sprachliche Voraussetzung für ein europäisches Parlament und eine europäische Armee sei.

Er stellte folgende Forderungen auf: 1. Einführung des Esperanto als Pflichtfach in den Schulen, 2. Esperantounterricht im Rundfunk, 3. Pflege des Briefwechsels mit andern europäischen Esperantisten, 4. Ferientausch von Esperantisten, 5. Esperanto-Universität in Straßburg, 6. Esperanto als Verhandlungssprache im Europarat in Straßburg, 7. Esperanto als zweite Sprache auf allen Papieren des internationalen Brief-, Zahlungs- und Warenverkehrs, 8. Esperanto als Kommandosprache der pan-europäischen Armee, 9. Gründung einer pan-europäischen Esperantozeitung.

In einer Esperantopredigt im katholischen Gottesdienst unterstrich Rektor Bartsch-Münster die Pflicht der Katholiken, durch Gebet und praktische Mitarbeit für den Frieden der Welt zu wirken.

Plia paŝo antaŭen...

La Unuigitaj Nacioj respondas al la Pacdeklaro de la TJO-Internacia Junular-Kunveno Konstanz 1950.

En letero de la 25a de Oktobro 1950, direktita al la sekretario de la TJO-Kunveno 1950 en Konstanz, Michel Schmidt, la Unuigitaj Nacioj el Lake Success konfirmas kun danko la ricevon de la pac-deklaro, subskribita de la 450 partoprenintoj de la Internacia Junular-Kunveno en Konstanz.

En sia letero la UN diras, ke UNESCO transprenis la proklamon por plua prilaborado.

La organizintoj de la TJO-Kunveno 1950 prave fieras pro tiu bela rezulto de sia laboro, ĉar tio estas agnosko de la porpaca laboro de l'Esperantista Junularo ĉe tiu institucio, kiu hodiaŭ estas la espero de ĉiuj pacemuloj en la mondo.

Jen, junaj esperantistoj: nia laboro ne estas vana!

Esperanto — Prüfstein für Schülersauslese

Nach den Anweisungen des Ministeriums für Volksbildung in Schleswig-Holstein für die Auslese geeigneter Schüler zum Übergang von der Grundschule auf eine weiterführende Schule werden die Schulkinder jeweils zwei Wochen in Probeklassen zusammengefaßt. Unter anderem ist auch die Ansprechfähigkeit des Schülers für eine Fremdsprache festzustellen. Mit

Genehmigung des Schulamtes in Heide wurde in der Büsumer Mittelschule Esperanto erstmalig für diesen Zweck verwendet. Aufgabe des Esperanto-Lehrers war es, in vier Unterrichtsstunden bei möglichst natürlicher Unterrichtsweise viel Gelegenheit zum sprachlichen Denken zu geben und die Sprachgesetze von den Kindern selbst finden zu lassen. Aus dem Erfahrungsbericht geht hervor, daß Prüflerler und Auslesekommission diesen Versuch als gelungen bezeichnen. Die Beobachtungen ergaben, daß ein durchschnittlich begabtes Kind in kurzer Zeit eine relativ große Menge von Esperanto-Sprachgut zu übersehen und durchzudenken vermag und somit sein sprachliches Denken in weit mehr Fällen beweisen kann, als dies bei der Anwendung anderer Fremdsprachen mit orthographischen und phonetischen Schwierigkeiten und großer Belastung durch Ausnahmen der Fall

ist. Die Kinder suchten mit Entdeckerfreude die Sprachgesetze des Esperanto, waren recht eifrig dabei, ihre grammatischen Kenntnisse anzuwenden, und freuten sich an der sprachschöpferischen Freiheit des Esperanto. Nebenbei gab das Aufsuchen verwandter Wortstämme in Fremd- und Lehnwörtern der deutschen Sprache einen Einblick in den Sprachreichtum der Kinder. (1d)

Juna esperantisto premiita en Esperanto-stenografio

En la ŝlesvigaj kaj ankaŭ danaj gazetoj oni povis legi antaŭ ne-longe la sciigon, ke en Flensburgo dum stenografia vetkibrado la 17-jara esperantisto Klaus Schlüter atingis ne nur la unuan premion por germana lingvo (240 silaboj), sed ankaŭ la noton „tre bona“ por stenografado en Esperanto en la rapideco de 140 silaboj. Unu gazeto aldonis, ke tia rezultajo eble estas unika en la postmilita germana federacia respubliko. — Ni gratulas al nia talenta juna samideano, membro de la grupo de Flensburg.

LINGVA KONSILEJO

Aktuala Terminareto

ankurbeln (Wirtschaft) stimuli
Abschleppdienst aŭtorena servo
Außenministerat der Großmächte konferenco de la eksterlandministroj de l' grandpotencoj
Behelfsheim provizora dometo
Bereitschaftsdienst rapidoservo; funkciopreta deĵoro
Bildschirm ekrano
Blickfang rigardkaptivo
blindschreiben (Maschinenschr.) skribi senrigarde
durchkämmen sisteme traserĉi
elektrischer Schlag elektra frapo, ~ skuo
entmilitarisieren senarmeigi, malarmi
Fausthandschuh sakoganto, pugno~
Faustregel proksimuma regulo, regulo por la praktiko
Fernlastkraftwagen longdistanca ŝarĝaŭto
Fertighaus muntebla domo
flau (Negativ) senkontrasta
Föhn (Gerät) harsekigilo, (Wind) feno
freihändig radfahren bicikli libere, sen manuzo
Gegenlichtaufnahme kontraŭluma foto
gemütlich agrable kaj komforte; sen ekscitiĝo
Geschäftslage (Verkaufs-): situo por vendado
Heimkehrer ekskapitito, revenanto el kapiteco. Spät~ retenito
Höhensonne (Gerät): transvioldradia lampo
Hoher, Hoch-, Oberkommissar alta, supera komisaro
Hungerstreik striko per nemanĝado
Lebensstandard vivnormalo, ~nivele
Leuchtschirm fluoreska ekrano
Leuchtstoff, ein „Phosphor“ fosforeskaĵo. Leuchtstoffröhre fosforeskaja lampo

linientreu parti-, doktrinfidela
Luftbrücke aeroplanponto
Make-up bel-kosmetikoj; „belaspektigo“
Ministerrat konsilantaro de, el ministroj
Mitläufer neaktivulo
Motorroller, Vespa: motorskutilo
Neubauer novkamplano, -ujo
Optik (in der Kamera) objektivo, lensaro
Preßstoff premlasto
Rauschgift narkotaĵo, narkotiko
Regie (Film) scenaranĝo, reĝisorado
remilitarisieren rearmi, rearmeigi
„Rückversicherer“ kaŝsubtenanto
Schnappschuß nepreparita, surpriza foto
Sex appeal seksa ekscito
Shampoo harlavajo
das Soll (Leistungssystem) labornorm(al)o. Übersoll normsuperado
Stichprobe prova kontrolo
Treibstoff (motor)brulaĵo
Treuhandgesellschaft sekestra societo
überholen preterrapidi; ripari, renovigi
Überstunde ekstra laborhororo; ~n machen postlabori
ultrarot, infra-: transruĝa, infra~
ultraviolett transviola, ultra~
Umschüler alilernanto
Untergrundbewegung nelega, kontraŭlega movado
Vamp „vampiro“, vampirulino
Verbindungsoffizier interliga oficiro
Vermittler serĉato
Verteilerkreis disirpunkto, ~cirklo
Viererbesprechungen kvar-ana konferenco, kvarpotenca ~
Warenhortung var-akaparado
Weihnachtsgratifikation kristnaska kromsalajro, ekstra salajro
Weitwinkelobjektiv vastangula, panorama objektivo
wilder Streik nesindikata striko

Hans Wingen.

nach dem deutschen amtlichen Einheitssystem

Bearbeitet von Wilhelm und Hans Wingen

2. Lehrstück

II.

1. **ŝt, ŝtr, ŝp, ŝpr:** ŝtato ŝteli ŝtrumpo ŝpari ŝprucas; poŝto.

2. **z:** mezo kazo rozo krizo uzo kaŭzi zorgo edzo, kuzo kuzino, uzado.

In mehrsilbigen **Stämmen** darf z wie s geschrieben werden: filozofa kazerno organizi gazeto viziti deziro bezoni mezuro amuzi muziko.

3. **ĝ:** reĝo naĝi loĝas ruĝa urĝa manĝi preĝejo ĝemi ĝardeno ĝenerale ĝusta.

4. **-oj, -ojn** (Mehrzahlendung): katoj katojn tasoj amikojn filoj gutoj paŝoj kantoj festojn.

5. Nachs. **-iĝ** (wie dt. -schaft): la leviĝo, vekigi fariĝas finiĝi sidigi tagiĝo amuzigi, altiĝi atentiĝi prezentiĝas.

6. **mi vi li ŝi ĝi** (1½-stufig) ni si; min lin, mia mian mianj miajn, lia sia ŝiaj siajn mi salutas vin, li amas ŝin, ni vidas ĝin; mia libro, liaj fratoj, ŝiajn manojn; siatempe, singarda.

7. **K.** de, de l', ili oni per por post sed sur mult al ilin ilia iliaj, perforto postkuri surmeti surverŝi multaj multflanke aldoni alveni aliĝi.

L. Longe ŝtefas ŝtelisto, tamen fine li pendos. Post la fino de l' batalo estas multe da kuraguloj. Ne karesu per mano, karesu per pano. Vortojn ŝparu, agojn faru! Post alktimigi doloras disiĝo. Vazo rompita longe sin tenas. Por hundon dronigi oni nomas ĝin rabia. Inter miaj muroj estas miaj plezuroj. Eĉ sur la suno troviĝas makuloj. El multaj milionoj fariĝas milionoj. Eĉ ŝtono verdiĝas, se ĝi longe ne moviĝas. Se vi faros vin ŝafu, la lupoj vin manĝos. Koro pleniĝis, lango moviĝas.

U. ŝtalo ŝtrumpeto ŝparas ŝpruci veŝto; kaso kazo, meso mezo, pesi pezi; plezuro revizoro; leĝo etaĝo ĝenas; stratoj stratojn viroj dubojn aktoj bestojn; troviĝi blindiĝis kontentiĝi. Mi petas vin, ŝi vokis nin, li lavas sin, via moŝto, nia ĉambro, per si mem, viaj leteroj, niajn kartojn. Perlabori, postlasi, surflugi, aldiri alrigardi. Tro da libero kondukas al mizero. Per guto post guto distalas granito. Li ne havas kapon de ministro. Sidi sur pingloj. For de l' okuloj, for de la ko o. Monto gravediĝis, muso naskiĝis. De zorgoj, ne de jaroj blankiĝas la haroj. Havi la okulojn sur ĝusta loko. Laŭdu la maron, sed restu sur tero. Oni prenas per manoj, redonas per piedoj. Pro multe da arboj li arbaron ne vidas. Post sufero venas prospero.

1. ŝt = ŝ, ŝtr = ŝ, ŝp = ŝ, ŝpr = ŝ: ŝtato ŝteli ŝtrumpo ŝpari ŝprucas; poŝto

2. z = z: mezo kazo rozo krizo uzo kaŭzi zorgo edzo, kuzo kuzino, uzado

3. ĝ = ĝ: reĝo naĝi loĝas ruĝa urĝa manĝi preĝejo ĝemi ĝardeno ĝenerale ĝusta

4. -oj, -ojn (Mehrzahlendung): katoj katojn tasoj amikojn filoj gutoj paŝoj kantoj festojn

5. Nachs. -iĝ (wie dt. -schaft): la leviĝo, vekigi fariĝas finiĝi sidigi tagiĝo amuzigi, altiĝi atentiĝi prezentiĝas

6. mi vi li ŝi ĝi ni si min lin, mia mian mianj miajn, lia sia ŝiaj siajn mi salutas vin, li amas ŝin, ni vidas ĝin; mia libro, liaj fratoj, ŝiajn manojn; siatempe, singarda

7. K. de, de l', ili oni per por post sed sur mult al ilin ilia iliaj, perforto postkuri surmeti surverŝi multaj multflanke aldoni alveni aliĝi

L. Longe ŝtefas ŝtelisto, tamen fine li pendos. Post la fino de l' batalo estas multe da kuraguloj. Ne karesu per mano, karesu per pano. Vortojn ŝparu, agojn faru! Post alktimigi doloras disiĝo. Vazo rompita longe sin tenas. Por hundon dronigi oni nomas ĝin rabia. Inter miaj muroj estas miaj plezuroj. Eĉ sur la suno troviĝas makuloj. El multaj milionoj fariĝas milionoj. Eĉ ŝtono verdiĝas, se ĝi longe ne moviĝas. Se vi faros vin ŝafu, la lupoj vin manĝos. Koro pleniĝis, lango moviĝas.

U. ŝtalo ŝtrumpeto ŝparas ŝpruci veŝto; kaso kazo, meso mezo, pesi pezi; plezuro revizoro; leĝo etaĝo ĝenas; stratoj stratojn viroj dubojn aktoj bestojn; troviĝi blindiĝis kontentiĝi. Mi petas vin, ŝi vokis nin, li lavas sin, via moŝto, nia ĉambro, per si mem, viaj leteroj, niajn kartojn. Perlabori, postlasi, surflugi, aldiri alrigardi. Tro da libero kondukas al mizero. Per guto post guto distalas granito. Li ne havas kapon de ministro. Sidi sur pingloj. For de l' okuloj, for de la ko o. Monto gravediĝis, muso naskiĝis. De zorgoj, ne de jaroj blankiĝas la haroj. Havi la okulojn sur ĝusta loko. Laŭdu la maron, sed restu sur tero. Oni prenas per manoj, redonas per piedoj. Pro multe da arboj li arbaron ne vidas. Post sufero venas prospero.

Letero pri la artikolo *Lingvouzo kaj Logiko*

Laŭ mia opinio la t. n. logikistoj funde tute ne estas logikistoj! Tio evidentiĝas el jenaj faktoj:

1. Unuflanke nur parto de tiuj esprimoj, kiujn la logikuloj titolas mallogikaj, efektive kontraŭas la logikon. Ekzemple la logiko — t. e. la scienco pri la ĝusta rezonado! — efektive ne povas decidi, ĉu radiko povas havi plurajn signifojn, kaj kiu el tiuj diversaj signifoj estas „la ĝusta“ kaj kiuj estas la „mallogikaj“. *Kanono* ekzemple havas en Esperanto inter aliaj la signifojn *paŝleĝo* kaj *eklezia katalogo*, kaj neniu el ili estas „mallogika“ en la vera senco de l' vorto. — En la plej multaj tiaj kazoj, la vorto *logika* havas la senco de *racia*, *prudenta* aŭ *facile komprenebla*; sed pri la prudenteco oni ja ofte povas disputi!

Eble iu logikulo nun ŝatas diri, ke oni ne estu tro precizema kaj ne ĉiam prenu la plej severan senco de l' vorto „logika“. Per tio li jam agnoskas, ke ne plu temas pri logiko, kiu ja ĝuste prenas ĉion en la plej strikta senco.

2. Aliflanke la logikistoj ne kritikis ĉion mallogikan! Mallogika en lingvo ekzemple estas metaforo kiel „la suno, la glora heroo, venkis la nokton“. La suno ja ne estas heroo. Sed metaforo efektas des pli multe, ju pli malprencajn objektojn ĝi interligas. Metaforo ofte estas intence mallogikaj, ankaŭ la metaforoj bone kompreneblaj! Kaj ankaŭ la aŭdanto tuj komprenas, ke temas pri intenca mallogikaĵo. Tamen metaforoj (kompreneblaj) estas kontraŭbatalataj de neniu logikulo, almenaŭ mi ne konas iun tian. Sed kial ne? Mi kredas: tial, ĉar metaforo estas dirata kun la intenco frapi la aŭskultanton; ĉar ĝi do estas kreata konscie, kaj ankaŭ la aŭskultanto tuj konscias, ke temas pri metaforo.

La logikistoj do fakte ne batalas por nepra logikeco en ĉiaj kazoj; ili kontraŭe vidas sian plej gravan celon en konscia uzado de la lingvo. Mallogikaĵojn ili atakas nur tiam, se tiuj signas senkonscian uzadon de la lingvo, kaj nur tial. Esence la logikuloj do estas racionalistoj.

El tio oni povas tiri la konkludon, ke la „logikistoj“ atakus eĉ metaforon,

se ĝi estus uzata senkonscie. Sed metaforoj senkonscie uzataj ekzistas: ekzemple se ili iĝas stereotipaj pro multa uziĝo. Kiel ekzemplo servu la germana esprimo „vom Leder ziehen“ = eltiri la glavon, kiu hodiaŭ signifas *ataki per vortoj*. Ĉe stereotipa uzado la metaforo kiel tuto elvokas la signifon; la signifo ne plu estas ligita al la unuopaj vortoj. Tial oni aplikas stereotipan metaforon ankaŭ en kazoj, kie la senco de la tuto ankoraŭ taŭgas, sed la uzata bildo ne plu. Rezultas aŭ ia „Stilblüte“ aŭ, ĉe daŭra uzado de la mismetaforo: paroliturno. Kaj efektive nia supra konjekto estas pravigata: stilflorojn kaj paroliturnojn la logikistoj kontraŭbatalas!

Interesa la afero estas ĉe unuopaj vortoj, solstaraj en frazo. El la diversaj signifoj de radiko oftege unu estas la origina signifo, kaj la aliaj estas metaforaj uzoj de tiu origina. *Ponto* ekzemple origine estis vojkondukilo trans riveron; sed hodiaŭ ĝi povas signifi simple interligilon: *Esperanto, la ponto inter la popoloj*. Kaj efektive, la „supera tavolo“ de la logikuloj konfesas, ke radiko rajtas havi diversajn signifojn: ili rimarkis,

(Daŭrigo en vidu p. 105)

Letero pri la artikolo *Lingvouzo kaj Logiko*

(Fino de paĝo 98)

ke temas pri metafora uzado, kaj tion ili ja permesas. Aliflanke ĉe solstaraj vortoj montriĝas la sama stereotipiĝo kiel ĉe metaforaj esprimoj; ĝi eĉ estas pli ofta. Al tio aldoniĝas dua fenomeno: oni ne ligas kun iu vorto, tute precizan signifon, kiel ĉe matematikaj terminoj, sed oni havas ideon pli-malpli klaran pri la vortosenso; oni aplikas la vorton ankaŭ en parencaj kazoj. Bela ekzemplo estas la vorto *logika*; ni vidis supre, ke ĝi signifas ne nur: *rilate al logiko*, sed ankaŭ *prudenta* ktp! Ankaŭ tiu fenomeno estas tre ofta; kaj pro tiuj du faktoj la kritikado de la logikistoj okazas grandparte sur la kampo de solstaraj vortoj.

La logikuloj do esence estas racionalistoj, postulantaj konscian lingvouzadon. Sed ĝuste tiu akcentado de l' uzo konscia estas la vunda punkto, ĉar uzado flua konsistas en parolado nekonscia, kaj ĉe tiu entrudas sin vole-nevole esprimoj ne tute logikaj. Tiuj fenomenoj absolute ne estas apartaĵo de Esperanto, sed okazas en ĉiuj lingvoj. Ĉie la meza homo ne kapablas pensi logike, t. e. tute precize, dum parolado.

Se oni kritikis mallogikajn ne-danĝerajn, asertante, ke en Esperanto oni ne rajtas diri tion, oni faras Esperanton esence pli malfacila ol la aliajn lingvojn, kaj tion pro kaŭzoj, kiuj eĉ ne estas kulpo de Esperanto, sed de la malperfekteco de l' homa intelekto. Miaopinie oni povas pledi por laŭeble konscienca uzado de la lingvo, sed ne por daŭre konscia. Kaj krome: oni estu indulgema.

Hans Wingen

Alibioj

(Fino de paĝo 102)

ris hejmen per fervojo. Mia alibio ŝajnis ja esti certa ĉiukaze. Malfeliĉe forbruliĝis — malgraŭ la sen-vanteo — pli ol laŭ mia intenco evus forbruli.

R. posedis ankoraŭ kelkmil florenojn de la asecura sumo, kiujn li deponis en la juĝejo. Oni retenis lin en aresto.

Tuj mi iris al la brulejo, por fari juran konstaton. Konvinkite, ke la maljuna Vabi jam estis informita pri la memakuzo de sia mastro, mi konsolis ŝin, sed tiamaniere mal-kovris al ŝi tion, kion volonte mi kaŝus al ŝi.

La asiza tribunalo kondamnis lin je kvin jaroj da peza karcerado kun fastotago ĉiumonata. Post tri jaroj la monarko lin amnestiis. Ankoraŭ nun li vivas tie kiel malriĉulo. Nek antaŭ nek post la brutkatastrofo li faris malbonon al iu ajn.

Jaroj pasis, de kiam mi estis translokita al Graz. Iun dimanĉon mi renkontis surstrate du urbe ornamentitajn junulinojn ĉe la brakoj de soldatoj. Ili rigardis min speciale.

Mi rekonis la belajn filinojn de l' muelisto aŭ, pli ĝuste — iliajn ruinojn.

(Vera okazintaĵo el la jaro 1883.)

LINGVA KONSULTEJO

Demando 6

En diversaj gazetoj mi legis foje „lingvuzado“, foje „lingvouzado“ kaj ankaŭ „lingvonuzado“. Kiu vortformo estas preferinda? A. P. T.

Respondo 6

Oni povas deklari ĝustaj ĉiujn tri formojn. S-ro W. W. en sia traktaĵo pri la lingvouzo aplikis la duan; mi memoras, ke ekz. Wüster preferis la unuan = lingvuzo. Sed se vi, laŭ la ekzemplo de „ĉionscia“ ŝatas „lingvonuzado“, kial ne?

Demando 7

Mi petas informon pri la akcentado de la landnomoj kun la finaĵo „io“. Siatempe la Lingva Akademio interpretis „io“ kiel finaĵon, se ĉi tiu silabo jam enestas en la internacia formo de landnomo, ekz. Germanien, Italien ktp. Ĉu tio devas signifi, ke la finaĵo „io“ estu ankaŭ nur unu silabo? Laŭ mia opinio konsistas „io“ el du silaboj. Do oni akcentu: Germanio, Italio, Bulgario kaj ne Germanio, Itálio, Bulgário.

K. Sch. G.

Respondo 7

Vi estas tute prava. La Esperanta gramatiko ne havas esceptojn. La fundamenta regulo (n-ro 10) tekstas: „La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.“ Nu, ĉiu vokalo formas silabon. Oni do povas diri nur Germanio ktp.

Al B. K. K. Pri „-antas...-atas“ sekvas alia artikolo. Ni estas samopinia kun vi, ke W. K. faris logikan eraron. „Mi estis vokata“, ekzemple, ne povas logike rezultiĝi „mi vokitas“, sed nur „mi vokatis“. (La helpverbo estas esprimata nur per siaj finaĵoj sufikse uzataj ĉe la respektivaj participoj.) Sed vi jam povas konstati, ke la pretendita „facileco“ de la formoj de Kindermann estas tre iluzia. La ĝisnuna Zamenhofa formo de la kunmetitaj tempoj estas tamen la plej simpla.

Herbst

Es fallen die Blätter,
der Sommer versank;
gelb, braun und rot,
welch Farbenklang!

Dann naht der Winter
mit Stürmen aus Ost,
deckt Blumen und Elend
mit Schnee und Frost.

Doch heimlich bereitet
der Frühling sich vor,
und mit ihm keimt Leben
und Freude empor.

Das Esperanto-Original dieses Gedichts von Moravec finden Sie in der EP Nr. 10/1949, Seite 72. Aus dem Esperanto übertragen von E. Unger.

La grandaj Figuroj de l' Homaro en la kadro de la kalendaro

DECEMBRO

En tiu ĉi monato naskiĝis


Jesus von Nazareth — fondinto de la kristana religio
1571 Johannes Kepler — germana astronomo
1639 Jean-Baptiste Racine — franca tragediisto
1713 Denis Diderot — franca enciklopediisto
1717 Johann Joachim Winckelmann — germana arkeologo
1747 Gottfried August Bürger — germana poeto
1769 Ernst Moritz Arndt — germana politikisto kaj poeto
1770 Ludwig van Beethoven — plej granda germana komponisto
1786 Carl Maria von Weber — germana komponisto
1795 Thomas Carlyle — angla verkisto
1795 Leopold von Ranke — germana historiisto
1797 Heinrich Heine — germana poeto
1801 Christian Dietrich Grabbe — germana dramisto
1803 Hector Berlioz — franca komponisto
1804 Benjamin Disraeli — angla ŝtatviro kaj verkisto
1810 Alfred de Musset — franca romantika poeto
1815 Adolf von Menzel — germana pentristo kaj grafikisto
1819 Theodor Fontane — germana verkisto kaj poeto
1832 Björnstjerne Björnson — norvega poeto
1837 Hans von Marées — germana pentristo
1843 Robert Koch — germana bakteriologo
1856 Ferdinand Avenarius — germana verkisto
1858 Giacomo Puccini — itala komponisto
1859 Ludwig Lazarus Zamenhof — kreinto de nia lingvo Esperanto

1863 Edvard Munch — norvega pentristo kaj grafikisto
1863 Franz von Lenbach — germana pentristo
1869 Henri Matisse — franca pentristo kaj skulptisto
1875 Rainer Maria Rilke — aŭstra poeto

En tiu ĉi monato mortis

43 v. Chr. Marcus Tullius Cicero — antikveromana oratoro kaj verkisto
1524 Vasco da Gama — portugala mond-esploristo
1547 Fernando Cortez — hispana konkeristo
1641 Anthonis van Dyck — flandra pentristo kaj gravuristo
1769 Christian Fürchtegott Gellert — germana poeto
1791 Wolfgang Amadeus Mozart — plej granda aŭstra komponisto
1803 Johann Gottfried von Herder — germana poeto kaj filozofo
1810 Philipp Otto Runge — germana pentristo
1835 August von Platen — germana poeto
1851 William Turner — angla pentristo kaj gravuristo
1859 Wilhelm Grimm — germana lingvisto
1863 Friedrich Hebbel — germana poeto kaj verkisto
1863 William Thackeray — angla verkisto
1870 Alexander Dumas patro — franca verkisto
1877 Gustave Courbet — franca pentristo
1889 Ludwig Anzengruber — aŭstra dramisto kaj rakontisto
1919 Pierre Auguste Renoir — franca pentristo kaj skulptisto
1909 Wilhelm Leibl — germana pentristo
1921 Camille Saint-Saëns — franca komponisto
1926 Claude Monet — franca pentristo
1926 Rainer Maria Rilke — aŭstra poeto
1933 Stefan George — germana poeto

Enigma piramido



1-a problemo: Metu en la kvadratojn de la ĉi-supra piramido jenajn literojn:

a — cc — d — eeeee — i — l —
n n n n — oo — p — ss — u

kaj vi ricevos (de supre malsupren):
1. vokalon; 2. pronomon; 3. prepozicion; 4. nomon de perdita loko; 5. nomon de Azia lando; 6. parton de la UNO.

La signifon de 6. montras ankaŭ la vortikomencoj, legate de malsupre supren.

2-a problemo: Metu en la ŝtupojn supren kaj malsupren po unu literon; la plej supra — i — estas komuna al ambaŭ vortoj, kiuj signifas:

- a) Afrikan regnon (supren)
- b) ekpuŝon de fizika forto (malsupren).

La horizontalaj vortoj aŭ literoj de supre estas: 1. vokalo (vidu supre); 2. mallongigo de antaŭa germana monunujo; 3. agrikultura okupo; 4. korp parto; 5. tero en akvo; 6. pluvnubo.

Ĉiuj vortoj estas senfinafaj.

J. B.

Enigma-Kajero

Lernu per enigmoj

Eine neue Sache ganz in Esperanto!
Ein Lernmittel zum Zeitvertreib für Anfänger und Fortgeschrittene!
Neues Material für die Ausstellung! Ein Abonnement als Geschenk für die Freunde in der ganzen Welt!

Das sind die Leitsätze des soeben im Format Din A 6 erschienenen 8 seitigen Rätselheftes!

Erscheinungsweise: Zweimonatlich
Einzelpreis: 20 Pf

Ein Abonnement kostet: Halbjährlich 0,75 DM, jährlich 1,50 DM.
(Zusendung einbeziffen)

Bestellen Sie bei Werner Dickel
Dortmund-Wellinghofen, Postfach

Kelkaj vortludoj

1. Kiu aĝo honoras la viron?
2. Kiu arbo estas manĝebla kaj trinkebla?
3. Kiu ario ne estas kantata sed kantanta?
4. Kiu bato ĝojigas?
5. Kiu dento ĉiam doloras?
6. Kiu doto estas senmona?
7. Kiu estro ne estas unu persono?
8. Kiu fero estas varmega?
9. Kiu fiŝo ne povas naĝi?
10. Kiu forto malfortigas nin?
11. Kiun fumon ŝatas la virinoj?
12. Kiu gento konsistas el nur unu persono?

Vizitkart-enigmo

O. Merti KALS

Kiun profesion havas s-ro Merti?

Solvoj de la enigmoj el n-ro 11

Magia diamanto

1. i, 2. ale, 3. aludi, 4. ilumini, 5. edifo, 6. ino, 7. i.

Solvo de la silab-enigmo kaj senfina rondo

1. sonato; 2. tolo; 3. lokomotivo; 4. vojo; 5. jodo; 6. domo; 7. mono; 8. novembro; 9. broso.

Solvo de la vizitkart-enigmo

Advokato-inĝeniero, aŭ: Inĝeniero-advokato.

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstraße 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich —12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17, Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.

Sofort beginnend!

Fernunterricht für A = Anfänger oder B = Fortgeschrittene

L. Funken

22b Bad Ems, Villenpromenade 5

Aus unserem Postbeutel

An mehrere. Sie haben die „Solvo“ (EP Nr. 10, S. 82) zu ernst genommen. Der Verfasser wollte keineswegs ein neues Länder-Suffix einführen. Seine Absicht war nur, sich etwas ironisch-satirisch über die verschiedenen „Skoloj“ zu belustigen, noch eine weitere dazu zu erfinden (nicht nur „erfinden“; er hat sie ja — als Druckfehler! — auch tatsächlich „gefunden“) und nun auch andere an dieser niemanden schädigenden und niemanden beleidigenden, mit einem kleinen Schuß Bosheit versehenen Freude teilnehmen zu lassen. Die Redaktion jedenfalls hatte nie gedacht, daß auch nur ein EP-ano den Scherz nicht verstehen würde. Also zur Beruhigung: „Germanico“ wird vorläufig vielleicht nur von den Esperantisten auf dem Mond gebraucht.

12 Seiten

Umfang, Zamenhof-Erinnerungen, Steno-Kurs, Novelle in Fortsetzungen - damit können Sie für EP werben!



Tag und Nacht

klimpern die Matrizen durch unsere Setzmaschinen. Achtzehn Setzer sind dabei, den Satz für Drucksachen in allen Sprachen zu liefern. Wir drucken Werke und Zeitschriften jeden Umfanges. Fragen Sie bei Bedarf bei uns an.

Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/L., Postfach 39

Für alle Selbstlerner

haben wir den Schlüssel zu unserem Lehrbuch von W. u. H. Wingen „Wir lernen Esperanto“ herausgebracht. Er enthält die Übersetzungen aller Übungen und eine Auswahl zusätzlicher Aufgaben. Er kostet 80 Pfennig und 8 Pf Porto. Durch alle Buchhandlungen oder direkt von der

Esperanto-Abteilung
der Limburger Vereinsdruckerei · Limburg/L.